DIA REGNO is the monthly journal of KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia), whose purpose is: "To create effective contacts among Christians of different countries, and by means of Esperanto to spread the Gospel of Jesus Christ." Membership in KELI with journal costs \$.85. Subscription only at the same price. Those interested ask for a sample from: *Sandgren, Verkmästargatan 18, Örebro, Sweden.* (AE accepts subscriptions for *Dia Regno* at the above rate.)

LITERATURA MONDO informas: "Pro financaj malhelpoj la aperigo de la revuo ne plu estas ebla. Ni ankoraŭ restis ŝulda al niaj abonantoj por du numeroj dum 1949. Kvankam ni ne sukcesis enkasi eĉ la preskostojn de la kvar numeroj, ni disponis ĉe niaj reprezentantoj, ke ili repagu al la abonanto la trionon de la pagita abonsumo, se la abonanto tion petas de ili."

UNU JARO DE LA UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOM-RAJTOJ

*Brigada Generalo CARLOS P. ROMULO, Filipina Respubliko
Prezidanto de la Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj*

Estas pruvo de la prudento kaj bona volo de la popoloj de la mondo, ke ili sukcesis venki siajn diferencojn sufiĉe por kompili Universalan Deklaracion de Hom-Rajtoj, asertante la eternan superecon de la homa spirito kaj la organan unuecon de la homa familio. La Deklaracio superas landlimojn kaj malaperigas dividojn de raso kaj religio. La amatajn liberecojn, por kiuj individuaj nacioj batalis en pasinta tempo kaj kiujn ili metis en la Konstituciojn de siaj ŝtatoj, la Deklaracio disvastigis al ĉiuj homoj. Ĝi estas la unua kolektiva proklamo de la neforigeblaj rajtoj kaj liberecoj, kiujn ĉiu homo devas posedi kiel civitano de la mondo.

La Deklaracio estas harmonia kunmeto de la diversaj politikaj, ekonomiaj kaj socialaj idealoj de la internacia komunumo. La grandaj konceptoj de politika libereco, esprimitaj en malnovaj dokumentoj kiaj la *Magna Carta*, estas reasertataj imprese kaj elokvente kaj aperas flanke de artikoloj, kiuj difinas socialajn kaj ekonomiajn rajtojn necesajn al stabileco kaj bonfarto de la moderna mondo. La Deklaracio estas produkto de interrenkonto de ideologioj reprezentantaj diversajn kaj eĉ kontraŭajn formojn de kulturo, tradicio kaj vivmaniero. Tial ĝi estas sana bazo por plua progreso.

La Deklaracio, kvankam grava per si mem, estas nur unua paŝo en la plenumo de unu el la ĉefaj celoj de la Unuigitaj Nacioj. La celo, difinita en la Enkonduko al la Ĉarto de U.N., estas la rekono, respekto kaj praktika apliko de la fundamentaj hom-rajtoj kaj liberecoj en ĉiuj membro-ŝtatoj. La Deklaracio difinas tiujn rajtojn kaj liberecojn. La proponita internacia Kontrakto pri Hom-Rajtoj, kiam ĝi estos finredaktita kaj aprobita, igos la rekonon de tiuj rajtoj leĝe deviga

por ĉiuj ŝtatoj, kiuj ĝin subskribos. Poste oni kreas organizon por la aplikado de la Kontrakto; ĝi starigos regulojn por efektiviĝi protekton de la rajtoj.

La fina celo estas helpo al la realigo de daŭra paco konstruota sur nedetruibla fundamento de libereco, justeco kaj universala respekto por la esenca homa digneco kaj por la hom-rajtoj donitaj de Dio.

—*EL UNITED NATIONS BULLETIN*, 15 Dec. 1949

HELPU DISKONIGI GRAVAN DOKUMENTON

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko ĝis nun presigis 5,500 ekzemplerojn de la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj, 2,500 en AE kaj 3,000 en aparta broŝuro 8-paĝa. Eminentuloj en kaj ekster UN multe laŭdis tiun publikigon. La UN-Sekretariejo en Lake Success petis nian asocion, sendi al ĝi mil ekzemplerojn de la Esperanto-teksto por tutmonda uzo. Laŭ nia scio ĝi estas la unua presaĵo en Esperanto, kiun UN disvastigas.

Okaze de la unujara datreveno de la Deklaracio, la Esperanto-eldono estis menciata en diversaj oficialaj UN-publikigaĵoj. Sur UN-foto montranta diverslingvajn eldonojn la Esperanto-teksto elstaris tre klare. Cetere ni rimarkis kun iomete da amuzo en la artikolo de la oficiala UN-BULTENO, ke diversaj tekstoj, inter ili tiu en Esperanto, estas "preparitaj aŭ aprobitaj de la aŭtoritatoj de la koncernaj ŝtataj." Ĉar nia lingvo estas internacia, la "aprob" sendube devus doni ĉiuj registaroj de la mondo aŭ UN mem!

Estas grave, ke la Deklaracio estu vaste diskonigata kaj ke tiel la utileco de Esperanto povu esti denove demonstrata al gravaj rondoj en la internacia vivo. Ni sincere petas ĉiujn legantojn de AE, ke ili helpu nin en tiu klopodo! Amikoj en diversaj landoj bonvolu instigi siajn Esperanto-libroservojn, ke ili enmetu la broŝuron en siajn librolistojn! Kie estas neeble pagi per mono, interŝanĝo kontraŭ libroj kaj broŝuroj povos esti aranĝata.

En okazo, ke via enlanda Esperanto-libroservo ne vendas la Deklaracion, vi povas mendi ĝin de *Amerika Esperantisto*, 114 West 16 St., New York 11, N. Y., Usono. Ni sendos unu broŝuritan ekzempleron de la Deklaracio kontraŭ du int. respondkuponoj. Aŭ, ni sendos unu ekzempleron de la speciala numero de la gazeto AE kiu enhavas la Deklaracion kaj la artikolon de S-ino Roosevelt, kontraŭ kvar int. respondkuponoj.

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

DUA VOLUMO DE LA KOLEKTO

(*Recenzo pri grava libro.*)

Leteroj de L. L. Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Presentado kaj komentado de Prof. G. Waringhien. Vol. II, 1907-1914, 376 pp. Volumoj I kaj II estas eldonitaj de SAT, Parizo, 1948. Riceveblaj de EANA. 114 W. 16 St., New York 11. N. Y. Binditaj. Unu vol. \$3.35 afrankite. La du volumoj kune \$6.50.

Por la historio de nia lingvo kaj movado la Dua Volumo de la "Leteroj" estas eĉ pli grava ol la Unua. Ĝi priskribas la Ido-konflikton kaj la dolorigajn eksperimentojn kaj batalojn pri la organiza problemo antaŭ la unua mondmilito. Se oni deziras studi la homajn kvalitojn de Zamenhof, oni eble trovos la Duan Volumon malpli kortuŝa, ĉar ĝi enhavas nenion, kio estus komparebla al la Javal-afero.

Estas evidente, ke ĉiu, kiu deziras funde koni la historion de Esperanto kaj la vivon de Zamenhof, nepre devas posedi ambaŭ volumojn. Ili plenigas multajn, kvankam ne ĉiujn, mankojn en la ĝisnuna scio. La "perfido" de Beaufront ankoraŭ restas iomete mistera, sed oni nun vidas klare, ke nek Beaufront nek Couturat intencis krei rivalan lingvon. Ili havis la iluzian opinion, ke ili povos devigi la Esperantistojn kaj la eksteran mondon akcepti "reformitan" Esperanton.

La malnova demando, *kiu* estis la aŭtoro de Ido, ĉu de Beaufront ĉu Couturat, nun ŝajne ricevas la definitivan respondon, ke la ĉefa aŭtoro estis Couturat, la kunaŭtoro de Beaufront, kies kontribuo al la projekto Ido fakte konsistis nur el la pluralo per *-i*, la imperativo per *-ez*, kaj la distingo inter la seksoj en la personaj kaj montraĵaj pronomoj.

Leganto admiros, kiel en la Unua Volumo, la prudenton

kaj praktikan senton de Zamenhof. Li ankaŭ ekhavas grandan respekton por la juĝkapablo kaj organiza talento de Generalo Sébert.

En preskaŭ ĉiuj leteroj pri la Esperanto-movado en Usono (precipe N-roj 415-423) Zamenhof esprimas dubojn pri la seriozeco de la movado en Ameriko. Eble la elekto de tiuj malfavoraj leteroj estis pura hazardo. En ili Zamenhof diskutas precipe planojn por organizi Universalan Kongreson en Chautauqua (kie oni unue intencis okazigi ĝin en 1909) kaj en Washington (kie ĝi fakte okazis en 1910 kun konsiderinda sukceso). La *Originala Verkaro* enhavas nur unu gravan leteron pri Usono (N-ro 29). Ĝi estas favora.

La Indekso de Temoj kaj Personoj estas utila en ambaŭ volumoj. Bedaŭrinde ĝi ne estas kompleta, kaj paĝociferoj ne ĉiam estas fidindaj. Ekz. Couturat, laŭ la Indekso, "hazarde rivelas al Jespersen la identecon de Ido" sur p. 174; fakte la raporto troviĝas sur p. 167.

Mi tute ne komprenas, kial Profesoro Waringhien eltrovis tiel malbonan sistemon por indiki la elparoladon de nomoj. Washington tiel fariĝas "ŭo!ŝin'txn", Sussmuth (la libro skribas Sussmath) "zysmat", North American Review "not'ame!rikxn rivju!".

La malbela *k* anstataŭ *kaj* eble ne estas kulpo de la kompilinto, sed de la eldonejo. Ĝi estas karakteriza signo de ia "SAT-dialekto" en Esperanto. Plej akre atakis tiun "strangajon" SAT-ano, G. J. Degenkamp, en "Esperanto 60-jara" (p. 31), skribante, ke *k* "estas rimarkinda nur pro sia senceco, kontraŭnatureco kaj -reguleco: per *k* anstataŭ *kaj* oni ne ŝparas atentindan spacon. Se ŝpari spacon oni dezirus, tro multvortaj aŭtoroj pli bone limigu siajn vortriĉajn artikolojn . . . Escepte de 'Sennaciulo' kaj iuj malgravaj bultenoj neniu serioza Esperanto-gazeto plu kripligas la vorton *kaj*." Kiel longe verkoj eldonitaj de SAT ankoraŭ suferigos paciencajn legantojn per tiu monstraĵo?

La bindo de la Dua Volumo estas multe pli bona ol tiu de la Unua. Preseraroj ne estas multnombraj. Kial verko eldonita

en 1949 pretendas esti aperinta en 1948, estas sekreto de la eldonejo.

Malgraŭ malgrandaj kritikindaĵoj la verko estas majstre kompilita kaj komentita de Profesoro Gaston Waringhien, kiu meritas sinceran dankon de la tuta Esperantistaro por bonega, grava, kompetenta kaj sendube treege temporaba laboro.

—W. S.

SECOND LARGE PRINTING OF "ESPERANTO"

A new edition of the book *ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE*, by G. A. Connor, D. T. Connor, Dr. W. Solzbacher, and Rev. Dr. J. B. Se-Tsien Kao, is just off the press. For the first time, this important book has been made available in an inexpensive paper-bound edition, (\$1.50 per copy, 10% discount for orders of 6 or more). It has been revised and brought up to date in many respects. Readers will find, for instance, the results of the United Nations Petition for Esperanto (pp. 33-34), the new addresses of ISAE (the International Association for Esperanto in Science), SEL (the Scout Esperanto League), KELI (the International Christian Esperanto League) and other organizations (pp. 141, 142, 131, etc.), and a reference to Dr. Solzbacher's election to the Esperanto Academy (p. 125). A few minor mistakes which had slipped into the first edition have been corrected.

The authors of the book, with the exception of Father Kao (now in Hongkong), are scheduled to present the case for Esperanto in the world-famous lecture program of Town Hall, New York, Tuesday, February 14. A demonstration lesson of the Cseh method of Esperanto teaching, by Doris Tappan Connor, will be included as one of the principal attractions of this program.

See enclosed announcement for details about the book.

TRAFA OPINIO DE KOLEGO

Pri la oftaj atakoj kontraŭ la demokrataj landoj, precipe Usono, en kelkaj orienteŭropaj Esperanto-gazetoj, la redaktisto de la sveda Esperanto-gazeto LA ESPERO, S-ro Oskar Svantesson, rimarkigis en la numero de Januaro 1950:

La nuna situacio en la "orientaj" landoj tre similas al la epoko de Hitler. La esperantistoj en Bulgarujo eldonas gazeton, en kiu oni en ĉiu numero atakas la okcidentajn landojn, precipe Usonon, kaj uzas la plej malbelajn esprimojn kiujn oni nur povas inventi. La esperantoorganizoj en Ĉekoslovakujo elsendas propagandon por sia ŝtato kaj en siaj gazetoj de tempo al tempo sonigas la tonojn de malamo kontraŭ la liberaj landoj.

Ni ne povas kompreni la aferon alimaniere, ke esperantistoj estas devigataj tiel fari, ĉar se oni ne farus, oni ne estus "lojala" al la ŝtato, kaj oni devus ĉesigi esperantan agadon.

En Germanujo antaŭ la dua mondmilito la esperantoorganizaĵoj staris antaŭ simila problemo. Oni provis turni la mantelon laŭ la vento, sed daŭre oni ne sukcesis fari ĉiujn akrobataĵojn, kiujn deziris la regantaj naziistoj.

Nun oni vole-nevole devas demandi al si, kiom longe la veziko restos sendifekta en la orientaj landoj. Kiam la esperantistoj en tiuj landoj ne sukcesos montri la utilon de la lingvo por la prospero de la nunaj diktatoroj en tiuj landoj, oni verŝajne malpermesos esperanton.

La esperantomovado staras en tragika pozicio. La liberamantaj esperantistoj certe ne ŝatas lasi la batalkampon al la komunisttendencaj esperantistoj, kiuj ja tute ne respektas la homajn rajtojn pri libera pensado. Kaj aliflanke la plejmulto de la liberamaj esperantistoj preferus eviti la batalon kun la subfosantoj de la libera vorto, de la libera interŝanĝo de leteroj kun ties pensoj, de liberaj vojaĝoj inter la diversaj landoj, de libera parolo pri iu ajn temo, kondiĉe ke oni ne perfortas.

Signa por la situacio estas, ke la alispeca diktatoreco en Portugalujo malpermesas esperanton kaj persekutas la esperantistojn.

Kiel oni en tiaj cirkonstancoj povas akcenti la unuecon de la esperanta movado? Kiuj el la pli idealismaj esperantistoj povas ŝati la elvomitan malamon de la gvidartikoloj, ekzemple de Internacia Kulturo?

"JARMILOJ PASAS," de Hermann Haefker, estas tre grava verko pri universala historio, verkita originale en Esperanto. Kvar libroj en unu granda, bela volumo de 500 paĝoj, 6 artaĵoj, 11 skizoj, lukse bindita kaj presita. \$3.65 aŭfrankite de AE.

EANA HONOR ROLL, 1949

(See editorial page for a word of comment and appreciation.)

Members of the Sustaining Board

Dr. Luella K. Beecher	Thomas A. Goldman
G. Clayton (<i>Canada</i>)	Tony Nabby
John L. Clewe	Arnold Pennekamp
R. E. Dooley	R. C. Palmer (<i>Canada</i>)
Robert Eadie	H. S. Sloan
David B. Ericson	Francis H. Sumner
Dr. G. P. Ferree	John W. Wood
Dan Ward Gibson	Mrs. Flora Wyman

Special Contributors to Sustaining Fund

L. E. V. Anderson	Dr. Stevens T. Norvell, Jr.
John M. Brewer	Miss Mazah E. Schulz
A. M. Brya	Herbert W. Smart
Mrs. Olive H. Campbell	Miss Isabel P. Snelgrove
Preston Davis, Jr.	Dr. Cecil Stockard
Ernest G. Dodge	Miss Maud Storms
J. H. Furay	M. M. Villareal
W. D. B. Hackett (<i>Canada</i>)	Mrs. Lee M. Wainman
George Hirsch	Anonymous

Patron Members

William G. Adams	Prof. Parry Moon
Mrs. Angela Alfaroli	Viktoro Murajo
Dr. Francis E. Ballard	Joseph H. Murray
Dr. Luella K. Beecher	Lola Mae Muse
Dr. Ferdinand W. Breth	W. B. Patzer
J. M. Clifford	Arnold Pennekamp
Alfred D. Dennison	D. W. Pittman
Ernest G. Dodge	Dr. M. J. Plese
Esp. Society of Detroit	Dr. Fritz Redl
J. H. Furay	H. Elwin Reed
Dan Ward Gibson	Wilfrid Rouleau
Mrs. Nellie Monte Gill	Joseph R. Scherer
Edwin W. Haynes	Charles E. Simon
William A. Knox	Herbert W. Smart
Eugene T. Lake	Dr. W. Solzbacher
Howard E. Latham	Prof. Joseph Tamborra
Fred H. McMann	Mrs. Flora Wyman
Fritz Mitschke	Zendia Esperanto-Klubo

AMERIKA ESPERANTISTO

Active Sustaining Members

H. R. Arnold	Ralph Harry	George S. Raymond
Clement Ayres	P. H. Hensley	A. E. Regal
Jewell Bainbridge	L. A. Lee Herbert	D. B. Richardson
Eugene Beck	Roy Hilton	R. E. Robichaux
Elven J. Bengough	George Hirsch	Dr. R. I. Rubinstein
Robert Betteridge	Floyd Hoffman	W. S. Ryan
Joy Postle Blackstone	Carrol A. Holbrook	Charles Ryder
Robert Blackstone	W. F. Holeka	Leo Saari
Charles H. Briggs	Roy E. Holland	David Sanford
Fred L. Broening	Harold Isele	J. H. Schackmann
G. Ewart Brown	Fabian S. Jacynia	Dr. Oswald Schlockow
A. M. Brya	Clemens O. Jaeger	Mazah E. Schulz
Sellers N. Bunch	Maurice Jagoda	Mrs. W. C. Schulze
Elbridge G. Cann	John W. Jeffers	Dr. A. M. Schwager
Mrs. E. G. Cann	Princess O. Jones	Jessie Scott
Jorge de M. Carvalho	Hans B. Julow	Mrs. Frank E. Seidman
H. B. Catlin, Jr.	Fred Kaelble	Jean Shapleigh
William C. Chapin	Peter M. Kaitis	Coleman Shuwarger
J. Leo Chapman	J. Kerdelevich	Michael Shuwarger
Charles Chomette	Dr. Margaret Kidder	Edwin Sievers
R. P. Christie	Delcevare King	Isabel P. Snelgrove
G. Clayton	A. S. Knapp	Regina Solzbacher
A. B. Coigne	Com. & Mrs. Lambert	Salvatore Spinella
Edward Collins	Russell R. Lambert	Mark Starr
Floreal Conchado	Jas. Larkin	J. M. Steinwinder
Affonso H. S. Correa	John P. Lawrence	Donald Stephens
S. C. Crook	Mrs. Augusta Lemmer	John S. Stewart
T. Edward Cushing	Mrs. Jos. Lencer	Lorraine Stypeck
Preston Davis, Jr.	Elise Lippmann	Iver Svarstad
George Dickau	Dr. R. D. Loewenberg	I. W. Swanson
H. E. Dillinger	Esp. Club Los Angeles	Herbert L. Thompson
R. E. Dooley	R. C. Marble	Nicholas Torzs
Paul Doubek	Mrs. R. C. Mather	May D. Van Sloun
James R. Douglass	Lemuel J. McCaulley	William Vathis
David M. Earl	Mrs. Frances McDowell	Frank W. Vedder
Franklin Edwards	G. Norman McKinney	James M. Vicary
A. J. Emery	E. L. Middleton	John Vidack
Warren Ewing	Herbert L. Miles	M. M. Villareal
John E. Falk	Ruth S. Moline	George Wagner
Cora L. Fellows	Edward D. Moore	Mrs. Lee M. Wainman
W. H. Fenton	Weldon T. Myers	W. O. Wanzer
Cipriano Ferraris	Gilbert Nickel	Arthur E. Warren
N. R. Garnes	Andrew O'Reilly	E. L. Wells, Jr.
Frank X. Graser	Frank L. Parsons	Dr. Lehman Wendell
Howard N. Guthrie	V. R. Gabriel Pausback	J. R. Wheeling
Bernard Haag	Mrs. Lois Petry	Donald W. Whipple
W. D. B. Hackett	Dr. P. L. Pratley	Jack Whitman
F. Hammerschlag	S. C. Pyfer	Albert Whitworth
Homer R. Hansen	Harold Ramsey	Dr. Charles R. Witt
H. S. Harris	Grace Randolph	Helene Wolff
Evelyn Harrison	Catharine Raymond	John W. Wood

KANADA INFORMO

Radio-dissendo pri Esperanto, en Toronto, okazis 27an Decembro en programo de CBC. *F-ino Jane Weston*, bone konata kaj talenta komentisto, intervjuis la prezidanton de Toronto Esperanto-Klubo, *S-ro Jerry Lambert*, en 15-minuta programo. (Tiuj, kiuj ĉeestis la EANA Kongreson en Toronto en 1948 sendube bone memoras la afablajn kaj helpemajn dissendojn tiutempe, kiujn *F-ino Weston* prezentis.) *S-ro Dez. Hackett*, sekretario de la Toronto Klubo raportis, ke li jam respondis al pli ol 20 inform-petantoj rezulte de la dissendo, kaj jam vendis pli ol 20 lernolibrojn al novaj personoj. Unu junulo en altlernejo, Hamilton, Ont., tiel multe interesiĝis, ke li kolektis grupon da 15 junuloj por studi Esperanton kune. Gratulon al la Klubo en Toronto pro bone farita laboro.

Granda afiŝo en Esperanto kun la vortoj "*Gaja Kristnasko — We hope you have one*" (kiel en Detroit) pendis dum la Kristnask-sezono super unu el la ĉefaj stratoj en London, Ont. *Raymond R. Canon*, studento en la Universitato raportis, ke personoj konstante haltigis ĉiun studenton—speciale tiujn, kiuj studas lingvojn—kaj demandis: "Kion signifas la vortoj sur la afiŝo? En kiu lingvo ĝi estas?" Rezulto: ĝenerala informo pri Esperanto!

Oleg Telizyn, Brantford, Ont., junulo nove veninta al Ameriko, jam komencis propagandi Esperanton en sia lernejo. Li sciigis, ke lerneja gazeto "*La Trumpeto*" baldaŭ publikigos lecionojn en Esperanto verkitajn de samideano *Telizyn*. Ni esperu bonan rikolton!

Frato Saturnin skribis antaŭnelonge, ke li translokiĝis al Victoriaville, Que., kie li instruas en Kolegio. Li daŭrigas sian intereson en Esperanto, kvankam la kolegia laboro postulas la plej multon de lia tempo.

Speciala Noto: Por egaligi la dolaron je pago per usona mono al EANA, deprenu 10% de niaj prezoj kaj kotizoj.

ESPERANTO-KRONIKO

Pastro J. B. Kao, famkonata ĉina Esperantisto, kiu multe helpis la movadon en Norda, Suda kaj Centra Ameriko kaj estas unu el la aŭtoroj de la libro "Esperanto: The World Interlanguage," sendis al ni Kristnasko-saluton el Hongkong. Raporto pri lia "morto" aperis en du Esperanto-bultenoj, unu en Eŭropo kaj unu en Suda Ameriko. Feliĉe tiu raporto—laŭ la fama diro de Mark Twain—estis "iomete troigita."

FAKTOJ PRI DANLANDO, interesa kaj riĉe ilustrita libro eldonita de la grava ĵurnalo *POLITIKEN* en Kopenhago, preskaŭ jam elvendiĝis, kvankam oni presigis 5,000 ekzemplerojn. Eĉ en landoj, kie oni ne povas aĉeti eksterlandajn librojn, ĝi disvastigis utilajn informojn pri Danlando, ekz. en Ĉekoslovakujo, kie—laŭ la gazeto *ESPERANTISTA*, Praha—"donaco de la reĝa legacio dana en Praha" ebligis dissendon al preskaŭ ĉiuj Esperanto-kluboj. Alivorte, la dana registaro pagis por la libroj. Estus dezirinde, ke aliaj registaroj sekvu tiun ekzemplon kaj ankaŭ disvastigu verketojn en Esperanto—kondiĉe, ke la informoj estu same objektivaj prezentataj kiel en *FAKTOJ PRI DANLANDO*. La verko estas havebla de nia libroservo por 75 cendoj. Ĝi estas enciklopedia libreto pri Danlando kaj Grenlando—broŝurita, 65-paĝa, kun 95 ilustraĵoj.

La grava Internacia Ordeno de Bontemplanoj (IOGT), kun 325,000 membroj, eldonos broŝuron en Esperanto kaj promesis aperigi artikolojn en kaj pri Esperanto en sia sveda gazeto *REFORMATORN*.

En Milwaukee, D-ro W. Solzbacher, Prezidanto de EANA, prelegis la 18an de Januaro en Holy Angels Academy, kie grupo da monakinoj nun studas Esperanton. Dum la prelego, D-ro Solzbacher kelkfoje priparolis Esperanton. *En Springfield, Ohio*, D-ro W. Solzbacher detale diskutis la problemon de internacia lingvo kaj Esperanton en publika prelego pri la Unuigitaj Nacioj la 15an de Januaro.

ESPERANTO-KRONIKO

35-a Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Paris de la 5a ĝis la 12a de Aŭgusto, sendube fariĝos impresa demonstracio de la vivanteco de nia lingvo. Kunsidoj eble okazos en la fama universitato Sorbonne. La franca poŝta administracio konsideras la eblecon eldoni Esperanto-poŝtmarkon okaze de la Kongreso. La francaj fervojoj donos rabaton al kongresanoj. Usonaj kaj kanadaj partoprenontoj bonvolu informi la Centran Oficejon de EANA. Ni deziras presi la informon en AE.

La 22-a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Romo de la 10a al la 17a de Aŭgusto, havos interesan programon, kun aŭdienco ĉe Papo Pio XII-a, prelegoj de Pastro A. J. Beckers, Belgujo, kaj D-ro Bruno L. Marini, Trieste kaj multaj vizitoj al vidindaĵoj. Miloj da katolikaj gazetoj en la tuta mondo menciis la Esperanto-Kongreson inter la aranĝoj de la Sankta Jaro 1950.

La unua televida programo pri Esperanto en Usono, okazis en la radiostacio de la Konsilantaro de Edukado en Philadelphia, la 9an de Februaro 1950. Oni intervjuis samideanon *Robert P. Montgomery* de la Esperanto-Societo de Philadelphia. S-ro Montgomery estas malnova Esperantisto, kiu dum multaj jaroj deĵoris en Ĉinujo kiel medicina misiisto. Lia edzino, D-rino H. P. Yue, estas bone konata kiel ĉina kuracistino inter la primitiva "Yow" (jaŭ) gento. Nuntempe, li kaj la familio de unu filo tri filinoj loĝas kaj studas en Philadelphia, Usono.

Kunmetitaj vortoj el Zamenhofaj Verkoj estas grava scienca verko de *Profesoro Naokazu Kawasaki*, Akademiano, en Japanujo. La 162-paĝa studo estas profunda esploro de ĉiuj kunmetitaj vortoj en la verkoj de Zamenhof. Eĉ la unua volumo de la "Leteroj" eldonitaj en 1948 jam estas analizita. Kvankam la klarigoj estas en japana lingvo, la libro estas uzebla por Esperantologoj ĉiulingvaj.



ESPERANTO-KRONIKO

Belan komplimenton nia gazeto ricevis de la veterano de Esperanto-ĵurnalismo, S-ro Paul Nylén en Svedujo. Li skribis al la Prezidanto de EANA: "Kiel multjara redaktinto de gazeto Esperantista mi admiras vian AE, kies enhavo estas ne sole interesa, sed en ĉiu detalo pure kaj tute senbalaste modelvalora."

Gazetoj, kiuj represis aŭ tradukis artikolojn el AE, estis inter aliaj: *Espero Katolika*, Nederlando (Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj); *Esperantista*, Ĉekoslovakujo (pri "la batalo de la lingvoj" en UNO); *La Espero*, Svedujo (pri la "samtempa" traduksistemo en UNO); ECO, Argentino (Bluzo kaj Pantalono).

Dum la Kristnaska tempo, en Detroit, ĉe Grand Circus Park, unu el ĉefaj placoj de la urbo, la firmo Walker & Co. starigis grandegan signon kun Esperanto-teksto "Gaja Kristnasko." Sube, en malpli granda skribo, estis angla aldono: "We hope you have one" (Ni esperas, ke vi havos ĝin). La literoj de la Esperanto-teksto estis unu metron (3 futojn) altaj. Detroit-anoj multe parolis pri tiu efika reklamo. Dankon meritas la firmo Walker & Co. Niaj samideanoj *Edwin Siewers* kaj *Joseph Murray* bone uzis la okazon por efika propagando por Esperanto.

En New York diversaj ĵurnaloj atentigis pri Esperanto. La vespera ĵurnalo *The Sun* (nun mortinta) publikigis leteron pri kaj por Esperanto de nia samideano *William Vathis*. La dimanĉa ĵurnalo *The Sunday Compass* en sia Kristnaska eldono enhavis duonpaĝan ĉefartikolon de *Tom O'Connor* sub la titolo dulingva "Ĝojan Kristnaskon—or Merry Christmas." *The New York Times* parolis pri Esperanto en artikolo pri la morto de la franca pioniro de aviado kaj Esperanto, *Ernest Archdeacon*. *United Nations Bulletin* menciis Esperanton inter la lingvoj en kiuj aperis la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj.

ESPERANTO-KRONIKO

Kontraŭ la konfuza kripligo de geografiaj nomoj en Esperantistaj libroj kaj gazetoj, precipe tiuj eldonataj de SAT, bonhumore protestis S-ro Georges Warnier, Prezidanto de la Unuiĝo Esperantista de Francujo, en Franca Esperantisto. Menciante la filmon pri Paris, kiun li montris en Bournemouth, li skribis: "En tiu filmo ne aperas monumentoj aŭ lokoj baptitaj senrajte de niaj SAT-amikoj: Ŝajo-Palaco, Praurba Insulo, Marsa Kampo, So-Parko, Dionizi-Portego, Tegoleja Ĝardeno, nomataj en la tuta mondo: Palais de Chaillot, la Cité, Champ de Mars, Parc de Sceaux, Porte Saint-Denis kaj Jardin des Tuileries."

*La saman problemon diskutis la Tria Laborkunsido de la Universala Kongreso de Esperanto en Bournemouth. Oni avertis la Esperantistojn, ke ili ne Esperantigu geografiajn nomojn en adreso, skribante ekz. *Novkastelo* por Newcastle aŭ *Malkara Flanko* por Cheapside (en London) — aŭ *Orienta Ŝinko* por East Ham!*

*La Nacia Eduka Asocio en Washington (National Education Association) jam publikigis duan eldonon de la 16-paĝa broŝureto pri Esperanto en la serio de *Personal Growth Leaflets*. Ĝis nun ĝi presigis 40,000 ekzemplerojn. La efikaj varbiloj estas mendeblaj de EANA je prezo de 25 cendoj por 25, kaj de \$7.50 por 1,000. *Sendu dolaron por 100 ekzempleroj aŭ frankite.**

NOVA ELDONO de "Esperanto: The World Interlanguage" ĵus aperis en bela broŝurita formato. Pro preso de granda kvanto, ili estas malmultekostaj. Unu ekz. kostas nur \$1.50. Je mendo de ses aŭ pli, 10% rabato (po \$1.35).

"Senpaga Esperanto-Kurso: Jen Por Vi" estas la rubriko super longa artikolo pri Esperanto kaj la nova kurso de Geo. W. Bailey, Jr., en la "New Hampshire News", Oktobro, 1949. S-ro Bailey raportas, ke tiu kurso nun regule kunvenas en la YMCA.

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

Brazilo. Adolfo Cardi Filho, Rua Redentor 29, Juiz de Fora, Minas. Dez. kor., interŝ. il. PK.

Ĉekoslavakujo. Tadeaŝ Dorotik, Komenskeho 1434/35, Most. Dez. kor.

Francujo. Roger Bizot, 9 Cours de la Pyramide, Carpentras (Vaucluse). 38-j. intruisto, dez. kor. pri sociaj aferoj.

Francujo. Robert Farail, 17 Kajo Richelieu, Bordeaux. 36-j. sporta ĵurnalisto dez. kor.

Germanujo. Willy Weilepp, vor dem Hamstertor 6 III, (19a) Halle (Saale), Sachsen-Anhalt, (Sov. Zono). Dez. kor.

Germanujo. Ernest Höhne, (15a) Weimar, Thür., Box 97. Serĉas interŝ. de PM. Kor. espe, angle, france, germane.

Grekujo. Konstanteno Trahos, Str. Johanou Theologou 95. Zografou, Athens. 21-j. dez. kor. kun gejunuloj.

Japanujo. Gahoo Takezaki, Toofukuji, Kaitookjoku-kunai, (Kaitoo), Kumamoto-ken. 37-j. budhista pastro dez. kor.

Kanado. Oleg Telizyn, 17 Terrace Hill, Brantford, Ont. Dez. kor. kun katolikaj gejunuloj tutmondaj, interŝ. PKI, PM.

Koreo. Kim ŭn Dal, 58-23 Kong Duk Dong, Ma-po-ku, Seul. Dez. kor., interŝ. il. PK.

Japanujo. F-ino Naoko Fujita, 288-2 ĉome, Kamitakata, Nakano, Tokio. 13-j. lernantino dez. kor., interŝ. il. PK.

Japanujo. Hatsutarō Asanuma, 55 Matsumoto, Mizudo, Amagasaki, Hyogo. Dez. kor. pri komercaj rilatoj kun la Amerikoj.

Hungarujo. F. Temesvari, Fö-u. 3, Zánka. Studento kaj terkulturisto dez. kor.

Germanujo. Herbert Klinger, (24b) Glückstadt/Holstein, Schlachterstr. 11. Grupo da rifuĝintoj dez. kor.

Japanujo. Hisashi Yoshikawa, Aomori, Nagashima 78. Instruisto de scienco dez. kor. kun fraŭlinoj.

Germanujo. Christian Bechtoldt, Bahnhofstr. 14, Wiesbaden (US Zono). Revenis el militkaptiteco en Siberio, dez. kor. kun ĵurnalistoj.

Japanujo. Tadaŝi Isobe, Gifu Nacia Sanatorio, Ooi-ĉo, Ena-gun, Gifu-ken. 20 novaj Esp-istoj dez. kor. kun Usonanoj, interŝ. il. PK

NOVAJ NOMOJ! Originalaj kaj universalaj por ĉio kaj ĉiuj. En Esperantujo ĉiam brilas la suno. Toleru trikot-novaĵon pri radio "oĵo" kostumo. Informoj pri ambaŭ ĉe: V. Eronen, Kerkkoo, Finnlando.

IMPORTANT WORKS AT SPECIAL PRICES

NOTE, that when you buy books from the *Esperanto Association of North America*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

"Universala Esperanto Metodo" by Dr. Wm. S. Benson

This great Esperanto book is again available. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and table of correlatives in 36 languages. Wonderful picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary — also *krestomatio* of fables, stories, humor, etc., all profusely illustrated — complete picture-dictionary in Esperanto, with most common words given in 40 languages. Encyclopedic and unique. Large volume, beautifully cloth bound, stamped in gold, 560 pp., all for \$6.00 (members *deduct* 10% up to June 15; i.e. send \$5.40 now).

"The World's Chief Languages" by Dr. Mario A. Pei

Famous guide to the languages of the entire world, incl. *ESPERANTO*. Formerly titled "*Languages for War and Peace*." New 3rd edition. Full grammatical surveys of world's great languages, with vocabularies — also alphabets and illustrations of the lesser languages, incl. many strange native tongues; and language history with linguistic maps — all written in interesting and easy-to-understand style. Text and vocabulary equivalents in English. A reliable guide for every student of language and languages. Big cloth volume, 663 pp., price \$6.00 (members *deduct* 10% up to June 15; i.e. send \$5.40 now).

THE LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM E.A.N.A.

You can learn *ESPERANTO*, or any of 27 other languages, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through E.A.N.A. for benefits to both yourself and your Central Office.

The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Special favorable arrangements for Members, Teachers and Clubs. Also *Canadian Members* will likewise receive favorable arrangements, and pay in Canada to Canadian agency without customs duty, etc. Write to us for details of our special *Linguaphone* offers.

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.

SEND FOR A COPY OF THE 'LIBROLISTO'

**10% Discount on All Items in Our Catalog
Sale Extended to June 15, 1950**

Because many members have not been able to take full advantage of the Special 10% Sale, due to low funds during the holiday and new-year season, we are extending the 10% discount on all items in our "*Librolisto*" to June 15, 1950. You may thus continue to buy all available items listed in our catalog at the 10% saving. Your purchases will aid in providing needed extra funds for the work of the Central Office. *Ask for a copy of the complete "Librolisto", and buy your books NOW.*

POPULAR NEW TITLES JUST RECEIVED (no discount on these titles)

"*LA ĜOJA PODIO*" by *Raymond Schwartz*. Truly a joyous medley of Schwartz at his best. Good humored (sometimes instructive!) poems, articles, lectures, playlets, with the Latin Quarter flavor. All sketches are short and easy to read. Highly recommended for the best in Esperanto humor. 271 pp. Artistic paper-bound edition, \$1.00. Cloth-bound edition,\$1.40.

"*INVITO AL CIELO*" by *James D. Sayers*. A highly fantastic story, originally in Esperanto, with its setting in Mars. It is based on religious prophecy and the coming "Armageddon". Although fantastic in setting, its author is intensely serious about its prophetic implications. Printed in Germany. 205 pp. Beautifully bound in art boards with cloth back. Price\$2.25

"*BRULANTA SEKRETO*" by *Stefan Zweig*. An outstanding book of the popular "Epoko Series". A good-reading "must" for all Esperantists. The following shorter stories are included in this book: "*Epizodo de la Ĝeneva Lago*", "*Batalo pri la Suda Poluso*", "*La Reĝa Ludo*", and the short letter written by Zweig, in Brazil, at the time of his tragic death—"Adiaŭa Letero". 158 pp. Price \$.70

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.